# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2013

*Kara Leganto, la lasta, septembra kunsido de nia E-societo kunportis multajn agrablajn novaĵojn, pri kiuj ni informos vin tuj. Unue, kiel sekretariino estis elektita s-ino Tina Seastrom. Kvankam ŝi estis elektita portempe, ĝis la (re)elekta novembra klubkunsido, ni esperas, ke ĉiuj el vi subtenos ŝin kiel sekretaria kandidato por la sekvantaj 2 jaroj. Dankon!*

*Dum la societa kunsido subite aperis du novaj vizaĝoj: studento de internacia juro kaj Mikaelo, kiu nur legis E-e, sed neniam parolis. Se ili sentos sin komforte en nia E-kolektivo, ni nepre konatigos vin kun ili.*

*En ĉi numero vi trovos informon pri la sekvanta Zamenhofa tago, UK de E-o en Bonaero. Kiel ĉefartikolo estas prezentata raporto de nia nova membro Randio pri la lasta NASK, kie li renkontis novelektitan prezidanton de UEA, d-ron Marko Fettes. Gratulon al samideano Marko!*


*Estimatoj, bv proponi kandidatojn por la prezidonta, vic-prezidonta, kasista, sekretaria postrenoj de la E-Societo. Reelekta kunsido okazos en Novembro de 2013. Agrablan legadon!* –La Redakcio

## NASK



NASK estas somera stud-programo kiu emfazas aktivan uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno kaj kunlaboro. Helpe de William Auld, la kursaron fondis Catherine kaj William Schulze en 1970 ĉe Sanfranciska Ŝtata Universitato (SFŜU), por pretigi instruistojn kaj plibonigi la lingvonivelon de usonaj Esperantistoj. Depost tiam pli ol 2000 studantoj el diversaj landoj jam venis al NASK por profiti gvidadon de vere internacia grupo de eminentaj instruistoj.

*Ho kara mia,*
*jen povra testamento*
*jen mia kredo*
*espero kaj tormento:*
*mi kredas pri la*
*bonvolo de l'homaro,*
*ke iam pasos*
*kruelo kaj amaro,*
*ke iam venos*
*la regno de l'racio;*
*sed multaj larmoj*
*necesos antaŭ tio.*
(de La infana Raso, B. Auld, 1956)



Mi havis grandan plezuron ĉi somere! Ni rekontiĝis en bela kampuso de la Universitato de Paco (William Peace University) en Raleigh, Norda Karolino, kie pluvas ĉiuj tagoj de la jaro – oni pensus. Mi studis tre forte je la antaŭaj semajoj de NASK. Mia celo estis ĉeesti en la mez-nivela kursaro. Kaj mi ekcitiĝis je la unua vespero ekkoni mian profesoron, Derek Roff.

Derek Roff: Dum pli ol dudek jaroj Derek gvidis la teknikan flankon de la Lingvo-Lerna Centro de la Universitato de Nova Meksiko, kie li kreis lernmaterialojn kaj donis teknologian subtenon al ĉiuj lingvoj instruataj ĉe la universitato. Derek eklernis pri Esperanto dum la 70-aj jaroj, kaj serioze studas ĝin ekde 1980. Li havis la bonŝancon viziti la tiaman NASK-on pli ol dek fojojn, kaj studis kun William Auld, Duncan Charters, David Jordan, Claude Piron, John Wells. Li instruis dum tri apartaj sesioj de NASK.

La lernantoj en mia klaso havis diversajn spertojn kaj lertecojn kun la Internacia Lingvo. Mi devas konfesi ke mia limigita lerteco metis min al la fundo de la klaso. Sed mi lernis pli da Esperanto ol mi kredis eblan. Kaj mi rekomendus mian profesoron. Mi kredis, ke li estas la plej bona instruisto en la mondo. Lia trankvila kaj pacienca konduto certigita, ke ĉiu havis ŝancon por partopreni. Kaj la klaso estis plena kun variaj da agadoj kaj ekzemploj. La studado estis prisemita de kelkaj aventuroj, kiuj stimulis min trovi mian propran motivaron. La kadro estis favora, kaj la personoj, kun aparta kora kvalito, puŝis min ekster la pozicion de la eternal komencanto. Koincide, dum la posta, samloka kongreso de Esperanto-USA, prelegis Orlando Raola pri la temo "Por ne plu esti eternal komencanto". Jen poemo, kiu multe inspiras min:

*Mi ĵuras ne lasi*
*la malamon senhonorigi mian animon,*
*sed disponigas min humile*
*kiel gardanton de naturo,*
*resanigiston de mizero,*
*kurieron de mirado,*
*arkitekton de paco.*
(el la poemo School Prayer de Diane Ackerman)

Tiuj vortoj tute respondas al la ideo, kiun mi havas pri Esperanto. *–Randy Ream*

# Movadaj Novaĵoj

– La 99-a Universala Kongreso de Esperanto okazos la 26an de Julio – 02an de Aŭgusto 2014 en Bonaero – ĉefurbo de Argentino. Jam aliĝis 155 gesamideanoj el 40 landoj, inter ili nur 6 usonanoj. Rapidu aliĝi per la plej favoraj prezoj, nur ĉi jare. Por eksenti "tangan" etoson de Argentino, vizitu ĉi paĝon: http://youtu.be/nJkj9w3mPCA *–UEA*

– Kanada esperantisto Brian Kaneen, kiu forpasis la 12an de januaro, 2012, testamentis al ESF pli ol duonan milionon da kanadaj dolaroj. "Mi vere ĝojas ke mia samurbano Brian montris tian fidon al nia agado," komentis la eliranta prezidanto de ESF, Mark Fettes. "Ŝajne lin impresis unuflanke la sukceso de lernu.net, kaj aliflanke la investoj, kiujn ESF faras sur la esplorkampo de lingva justeco. Lia malavara donaco helpos nin ampleksigi nian agadon precipe sur ĉi tiu dua tereno." Kaneen, universitata docento pri la germana lingvo, estis aktiva en la kanada Esperanto-movado, interalie kiel instruisto kaj sekretario de la vankuvera klubo. Modesta homo kun modesta vivstilo, li ĉiam energie pledis por pli da konscio kaj engaĝiĝo pri lingvopolitikaj demandoj. Tiu sinteno fontis interalie el lia propra junaĝa sperto de lingvomorto sur Manks-insulo; alia testamenta disponigo kreis stipendion por manksaj junuloj kiuj volas studi keltan lingvon. *–ESF*

# El Nia Leterkesto

Salete kaj Mário Santos, loĝantaj en Cacém – je mezvojo de Lisbono al Sintra, decidis malfermi sian hejmon al homoj, kiuj (kiel ni) vivas en soleco, kaj timas la riskojn devenantaj el tiu situacio. La domo konsistas el 4 cambroj, el kiuj 3 vakas. Oni celas ne financajn interesojn, kaj pro tio la elspezoj estas disdividitaj inter la membroj de la "Familio", kie ni estas inkluditaj. La kostoj po ĉambro, estas pli malpli 1100 euroj. Se 2 homoj kunvivas en sama ĉambro, tiam ili pagos pli malpli 1600 €, kun manĝoj, tamen tiuj-ĉi ne estas devigaj. La fundamentaj kondiĉoj por la kandidatoj estas:

1 – Ne suferadi pro nekapabliganta malsano, ekzemple, Alzheimer.
2 – Havi kaplabecon pagi sian parton de la elspezoj.
3 – Aniĝi al PEA – Portugala Esperanto Asocio.

Ni, fakte, deziras antaŭ nelonge kunvivadi kun geesperantistoj portugalaj kaj/aŭ alilandaj. Jen estas la adreso: Rua do Miradouro Nº 12, 2735-300 Cacém, Portugalio, saletemariosantos@gmail.com

# Zamenhofa Tago kaj Bankedo 2013

Zamenhofa Tago kaj Bankedo 2013 okazos sur la 24a etaĝo de MDA City Apartments laŭ adreso: 63 E. Lake St., Chicago. Vidu detalojn en la sekvanta n-ro de "Saluton!"







## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Oktobro – D. Kirschbaum: La Artgalerio de Uffizi, Florenco, Italio

26an de Novembro – Raporta kaj elekta kunsido, Araneo – pri E-konferenco en Kolomeo

15an de Decembro – Zamenhofa Tago kaj Bankedo 2013